pekinta senintence, Dio facile pardonas. — Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. — La falinta homo ne povis sin levi. — Ne riproĉu vian amikon, ĉar vi mem pli multe meritas riproĉon; li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto. — La tempo pasinta neniam plu revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. — Venu, ni atendas vin, Savonto de la mondo. — En la lingvo „Esperanto" ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo. — Aŭgusto estas mia plej amata filo. — Mono havata esta pli grava, ol havita. — Pasero kaptita estas pli bona, ol aglo kaptota. — La soldatoj kondukis la arestitojn tra la stratoj. — Li venis al mi tute ne atendite. — Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto.

flui couler.
movi mouvoir.
strato rue.
fali tomber.
at marque le participe présent d'un verbe passif.
peki pêcher.
int marque le participe passé d'un verbe actif.
intenci se proposer de.
levi lever.
riproĉi faire des reproches à.
meriti mériter.
mensogi mentir.
pasi passer (intrans.).
neniam ne..., jamais.
ont marque le participe futur d'un verbe actif.
neniu personne.
atendi attendre.
savi sauver.
mondo monde.
lingvo langue, langage.
grava grave, important.
pasero passereau.
kapti attraper.
aglo aigle.
ot marque le participe futur d'un verbe passif.
soldato soldat.
konduki conduire.
aresti arrêter.
tra à travers.
juĝi juger.

21e EXERCICE

La feino (Fino).

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj [1], petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. Ŝi rakontis al li sian tutan aventuron. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas [2] pli grandan indon, ol ĉio, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino, forkondukis ŝin al la palaco de sia patro, la reĝo, kie li edziĝis je ŝi. Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.

id descendant de, enfant de.
kelke quelque.
aventuro aventure.
konsideri considérer.
inda, qui mérite...
doto dot.
palaco palais.
iĝ se faire, devenir...; ex. **pala** pale — **paliĝi** pâlir; **sidi** être assis — **sidiĝi** s'asseoir.
je se traduit par différentes prépositions que le contexte suggère très aisément.
propra propre (à soi).
akcepti accepter, accueillir.
baldaŭ bientôt.
angulo coin, angle.

1. „Kelke da“ formo adverbiale équivalente à **kelkaj perloj, kelkaj diamantoj.** De même qu'il dit **multe da, malmulte da,** l'Esperanto peut dire **kelke da.**

2. Comme nous l'avons déjà remarqué, l'Esperanto emploie le présent toutes les fois que le fait est présent. Au point de vue de la logique, le passé que nous mettrions ici, en français, est tout simplement un non-sens.

22e EXERCICE

La conjugaison. — Temps composés.

Nun li diras al mi la veron. — Hieraŭ li diris al mi la veron. — Li ĉiam diradis al mi la veron. — Kiam vi vidis nin en la salono, li estis dirinta al mi la veron. — Li diros al mi la veron. — Kiam vi venos al mi, li estos dirinta al mi la veron. — Se mi petus lin, li dirus al mi la veron. — Mi ne farus la eraron, se li estus dirinta al mi la veron. — Kiam mi venos, diru al mi la veron. — Kiam mia patro venos, estu dirinta al mi la veron. — Mi volas diri al vi la veron. — Tuj kiam mi estos ricevinta vian leteron, mi foriros. — Se mi estus aŭdinta tion, mi ĝin dirus. — Kiam mi estis kolektinta la sumon, mi aĉetis novan libron. — Estas necese ke vi estu fininta vian laboron, antaŭ ol mi revenos. — Mi dezirus ke vi estu vidinta lin antaŭe. — Kiam li estis estinta tre obea, mi rekompensis lin [1].

salono salon.
tuj kiam aussitôt que (aussitôt quand).
foriri partir.
kolekti amasser, réunir.
sumo somme.
necesa nécessaire.
obea obéissant.

1. On consultera avec utilité le *Commentaire* à la page 105 (*Le passé*) et à la page 108 (*Temps et formes d'antériorité*). — Pour le verbe être, voir ce que nous disons page 23, à la fin de la note et dans le *Commentaire*, pages 50, 51.

Mais ceci ne vise que le moment où l'on refera, en thème, la version de cet exercice.

23ᵉ EXERCICE

La conjugaison. — Verbe passif.

Mi estas amata. Mi estis amata. Mi estos amata. Mi estus amata. Estu amata. Esti amata. — Vi estas lavita[1]. Vi estis lavita. Vi estos lavita. Vi estus lavita. Estu lavita. Esti lavita. — Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi. — La surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi. — Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam de longe konstruita. — Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi. — Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ. — Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi. — Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. — Honesta homo agas honeste. — La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge (aŭ antaŭ nelonga tempo), loĝis longe en nia urbo. — Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme? — Sur la kameno inter du potoj staras fera kaldrono; el la kaldrono, en kiu troviĝas bolanta akvo, eliras vaporo; tra la fenestro, kiu troviĝas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton.

invit**i** inviter.
komerc**i** commercer.
aĵ quelque chose possédant une certaine qualité ou fait d'une certaine matière; ex. **mola** mou, **mo-**

1. Voir dans le *Commentaire sur la grammaire Esperanto*, page 45, ata ou ita?
Comme pour l'exercice précédent, ce renvoi vise le moment où la version sera mise en thème.

laĵo partie molle d'une chose, **komercaĵo** marchandise, article de commerce.
surtuto, pardessus.
sekvi suivre.
konstrui construire.
ŝuldi devoir (dette).
oro or (métal).
ringo anneau.
lerta adroit, habile.
projekto projet.
inĝeniero ingénieur.
fero fer.
vojo route, voie.
agi agir.
pastro prêtre.
kameno cheminée.
poto pot.
kaldrono chaudron.
troviĝi se trouver.
boli bouillir.
vaporo vapeur.
pordo porte.
korto cour.

24e EXERCICE

L'accusatif de direction.

Kie vi estas? Mi estas en la ĝardeno. — Kien vi iras? Mi iras en la ĝardenon. — La birdo flugas en la ĉambro (ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi). — La birdo flugas en la ĉambron (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin). — Mi vojaĝas en Hispanujo. — Mi vojaĝas en Hispanujon. — Mi sidas sur seĝo kaj tenas la piedojn sur benketo. — Mi metis la manon sur la tablon. — El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun ĝi kuras sub la lito[1]. — Super la tero troviĝas aero. — Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo. — Mi staras ekster la domo, kaj li estas interne. — En la salono estis neniu krom li kaj lia

1 Quand on remettra cette version en thème, on consultera avec utilité le *Commentaire* à la page 66.

fianĉino. — La hirundo flugis trans la riveron, ĉar trans la rivero troviĝis aliaj hirundoj. — Mi restas tie ĉi laŭ la ordono de mia estro. — Kiam li estis ĉe mi, li staris tutan horon apud la fenestro. — Li diras, ke mi estas atenta. — Li petas, ke mi estu atenta. — Kvankam vi estas riĉa, mi dubas, ĉu[1] vi estas feliĉa. — Se vi scius, kiu li estas, vi lin pli estimus. — Se li jam venis, petu ke li venu al mi. — Ho, Dio! kion vi faras! — Ha, kiel bele! — For de tie ĉi! — Fi, kiel abomene! — Nu, iru pli rapide!

ekster hors, en dehors de.
vojaĝi voyager.
piedo pied.
benko banc.
et marque diminution, décroissance; ex. **muro** mur — **mureto** petit mur; **ridi** rire — **rideti** sourire.
meti mettre.
kanapo canapé.
muso souris.
lito lit.
super au-dessus de, par dessus.
aero air.
kafo café.
teo thé.
sukero sucre.
kremo crème.
interne à l'intérieur, dedans.
fianĉo fiancé.
hirundo hirondelle.
trans au delà.
rivero rivière, fleuve.
estro chef.
atenta attentif.
kvankam quoique.
dubi douter.
ĉu est-ce que et si, dans une question indirecte.
estimi estimer.
fi !! donc!
abomeno abomination.
rapida rapide, vite.

1. Ĉu est-ce que prend logiquement la place de *si* dans une interrogation indirecte.

25e EXERCICE

L'article. — Les mots composés.

La artikolo „la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple Rusoj aŭ Poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa[1]. Anstataŭ „la" oni povas ankaŭ diri „l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo). — Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj : skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas); internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (= de la tuta mondo); unutaga (= kiu daŭras unu tagon); unuataga (= kiu estas en la unua tago); vaporŝipo (= ŝipo, kiu estas movata per vaporo); matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (= pago por la abono).

artikolo article.
tiam alors.
kiam quand.
objekto objet.
tia tel.
kompreni comprendre.
ekzemplo exemple.
Polo Polonais.

1. Voir dans le *Commentaire*, page 12, le principe qui règle l'emploi de l'article en Esperanto ; mais uniquement quand on remettra cette version en thème.

prepozicio préposition.
vokalo voyelle.
kunmeti composer.
simpla simple.
ligi lier.
radiko racine.
soni sonner, rendre des sons.
klara clair.
postuli exiger, requérir.
gramatiko grammaire.
nacio nation.
diversa divers.
ŝipo navire.
matenmanĝi déjeuner.
aboni prendre un abonnement à.

26ᵉ EXERCICE

Les prépositions et l'accusatif.

Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple : por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon ,, n " ; sekve : tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras : ,, la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon ", kaj la vortoj ,, ĝardenon ", ,, tablon " staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj ,, en " kaj ,, sur " tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo ne troviĝis antaŭe en la ĝardeno, aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon ,, n " tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). Mi restos hodiaŭ dome. — Jam estas tempo iri

domen. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn : mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. — Flanken, sinjoro![1] — Mi konas neniun en tiu ĉi urbo. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton).

nominativo nominatif.
iam jamais, un jour.
akuzativo accusatif.
tie là-bas, là, y.
dependi dépendre.
kaŭzo cause.
esprimi exprimer.
direkti diriger.
celi viser.
egala égal.
ia quelconque.
veturi aller, partir (à l'aide d'un véhicule).
dis marque séparation, dissémination; ex. **iri** aller — **disiri** se séparer, aller chacun de son côté.
flanko côté.
dekstra droit, droite.
neniel nullement, en aucune façon.
nek... nek ni... ni.

27e EXERCICE

Le préposition je *et l'accusatif.*

Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion ,, je ''. Sed estas bone uzadi la vorton ,, je '' kiel eble plej malofte. Anstataŭ la vorto ,, je '' ni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ : mi ridas pro lia naiveco, aŭ : mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ : la lastan fojon).

1. Quand on remettra cette version en thème on consultera avec profit les pages 65, 66 du *Commentaire*.

— Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ : mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri „ obei al la patro " kaj „ obei la patron " (anstataŭ „ obei je la patro "). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple : ni povas diri „ pardoni al la malamiko " kaj „ pardoni la malamikon ", sed ni devas diri ĉiam „ pardoni al la malamiko lian kulpon "[1].

senco sens, acception.
komuna commun.
ebla possible.
ofte souvent.
ridi rire.
lasta dernier.
sopiri soupirer.
regulo règle.
verbo verbe.
obei obéir.
permesi permettre.

28e EXERCICE

Mots simples[2].

Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni[3], ĉar el

1. Le point traité dans les exercices 21, 26 et 27 se trouve exposé théoriquement et appuyé de nombreux exemples dans le *Commentaire*, que l'on peut consulter en cas de doute, aux pages 63 et suivantes. On y trouve de très utiles remarques pour le choix des prépositions. Il faudra lire attentivement ces pages avant de remettre en thème la version ci-dessus.

2. Pour le sens que nous attachons à cette expression, mais surtout pour la meilleure manière d'apprendre les mots simples dont le tableau se trouve à la page 38 de cet ouvrage, on se trouvera bien de lire ce que nous disons dans le *Commentaire* à la page 117 et suivantes.

3. La préposition *el* exprime une idée d'extraction, de sortie et

ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. Se ni aldonas al ili la literon „k“, ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn : kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu. Se ni aldonas la literon „t“, ni ricevas vortojn montrajn : tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu. Aldonante la literon „ ĉ “, ni ricevas vortojn komunajn : ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu. Aldonante la prefikson „nen“, ni ricevas vortojn neajn : nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu. Aldonante al la vortoj montraj la vorton „ĉi“, ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple : tiu (pli malproksima), tiu ĉi aŭ ĉi tiu (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime). Aldonante al la vortoj demandaj la vorton „ajn“, ni ricevas vortajn sendiferencajn : kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn. Ekster tio, el la diritaj vortoj, ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple : tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (=kaj tiel plu : *et ainsi davantage, et ainsi de suite*).

ia quelconque, quelque.
ial pour une raison quelconque.
iam jamais, un jour.
ie quelque part.
iel d'une manière quelconque.
ies de quelqu'un.

signifie *de, d'entre, é —, ex —*. Ex. : *iri* aller; — *Eliri* aller hors de, sortir; — *Elĵeti* jeter hors de, rejeter; — *Elveni* venir de, provenir; — *Eliĝi* sortir, se retirer de. Comme préfixe cette préposition donne souvent au mot une idée de *parachèvement* : l'œuvre est tout à fait terminée, on l'a accomplie d'un bout à l'autre, on en sort. Ex. : *lerni* apprendre, *ellerni* apprendre à fond; — *Ellabori* travailler (une chose) à fond, achever.

io quelque chose.
iom quelque peu.
iu quelqu'un.
konsili conseiller.
serio série.
pronomo pronom.
adverbo adverbe.
litero lettre (de l'alphabet).
rilati avoir rapport à.
prefikso préfixe.
ajn que ce soit.
diferenci différer (intrans.).
helpi aider.
sufikso suffixe.

29ᵉ EXERCICE

La dérivation et la composition.

Lia kolero longe daŭris. — Li estas hodiaŭ en kolera humoro. — Li koleras kaj insultas. — Li fermis kolere la pordon. — Lia filo mortis kaj estas nun malviva. — La korpo estas morta, la animo estas senmorta. — Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol unu tagon. — Li parolas, kaj lia parolo fluas dolĉe kaj agrable. — Ni faris la kontrakton ne skribe, sed parole. — Li estas bona parolanto. — Starante ekstere, li povis vidi nur la eksteran flankon de nia domo. — Li loĝas ekster la urbo. — La ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno. — Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro. — Kia granda brulo! kio brulas? — Ligno estas bona brula materialo. — La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas nun brule varmega. — Ĉu li donis al vi jesan respondon aŭ nean? — Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris en la manĝoĉambron. — La birdo ne forflugis[1] : ĝi nur deflugis de la arbo,

1. S'enfuir se dit logiquement en Esperanto d'une façon différente, suivant le mode de fuite qu'emploie l'animal en question. S'il se sauve en

alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton. — Por ĉiu aĉetita funto da teo tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero. — Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni. — Li portas rozkoloran superveston kaj telerforman ĉapelon. — En mia skribtablo troviĝis kvar tirkestoj. — Liaj lipharoj estas pli grizaj, ol liaj vangharoj.

humoro humeur.
fermi fermer.
korpo corps.
animo âme.
kontrakti contracter.
um suffixe peu employé, et qui est, dans les affixes, le pendant de *je* dans les prépositions. Bien que les mots où il entre doivent être appris comme s'ils étaient de simples racines, il n'en a pas moins son utilité pour la mémoire comme on peut le remarquer par *kolumo* faux-col, collet, *manumo* manchette, etc.
plenumi accomplir.
bruli brûler (être en feu).
ligno bois.
materialo matière.
bastono bâton.
tegmento toit.
funto livre (mesure).
ist marque la profession; ex. **boto** botte — **botisto** bottier; **maro** mer — **maristo** marin.
koloro couleur.
telero assiette.
tero terre.
kesto caisse, coffre.
tiri tirer.
tirkesto tiroir.
lipo lèvre.
haro cheveu.
griza griz.
vango joue.

courant, on dit **forkuri** (l'homme, le chien, etc.); s'il se sauve en rampant, on dit **forrampi** (reptiles); s'il se sauve en nageant, on dit **fornaĝi** (poissons); s'il se sauve en volant, on dit **forflugi** (oiseaux).

30e EXERCICE

***Suffixe de profession*, ist — *et préposition* da.**

(Pour le suffixe **ist**, voir à la page 36 de cet ouvrage).

Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas baldaŭ teatrajn manierojn. — Kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj kiu okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto. — Diplomatiiston oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem. — La fotografisto fotografis min, kaj mi sendis mian fotografaĵon al mia patro. — Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe troviĝis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino [1]. Alportu al mi metron da nigra drapo (metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo). — Mi aĉetis dekon da ovoj. — Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. — Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj. — Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn. — Sur la arbo troviĝis multe (aŭ multo) da birdoj. — Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj. — En la ĉambro sidis nur kelke da homoj. — „Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.

teatro théâtre.
maniero manière, façon.
okupi occuper.
meĥaniko mécanique.

1. Le *Commentaire*, aux pages 63, 64, fixe pleinement les offices différents des deux prépositions *de* et *da*. On fera bien de le consulter quand on remettra cette version en thème.

ĥemio chimie.
diplomatio diplomatie.
diplomato diplomate.
fiziko physique.
scienco science.
glaso verre (à boire).
nigra noir.
drapo drap.
signifi signifier.
ovo œuf.
bordo bord, rivage.
maro mer.
amaso amas, foule.
aŭtuno automne.
lando pays.
suferi souffrir, endurer
najbaro voisin.
mezuri mesurer.

31° EXERCICE

Suffixe des contraires, mal — *et suffixe des êtres féminins*, in.

(Pour ces deux suffixes, voir à la page 32 de cet ouvrage).

Mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda : li estas de meza kresko. — Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo. — Haro estas tre maldika. — La nokto estis tiel mal-luma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo. — Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono. — Malbonaj infanoj amas turmenti bestojn. — Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita. — Mi forte malestimas tiun ĉi malnoblan [1] homon. — La fenestro longe estis nefer-mita [2]; mi ĝin fermis, sed mia frato tuj ĝin denove

1. Le Français qui a „noble" (dans le sens de grand, de beau par les sentiments, le caractère) n'a pas, comme l'Esperanto, d'adjectif qui lui soit strictement opposé. Nobla noble, malnobla le contraire.

2. Si l'idée est purement négative, comme dans ce mot, l'Esperanto n'emploie pas *mal*, suffixe des contraires. Une fenêtre *nefermita* (non fermée) n'est pas une fenêtre *malfermita* (ouverte); les deux battants rapprochés l'un de l'autre mais laissant passer l'air constituent la pre-

malfermis. — Rekta vojo estas pli mallonga, ol kurba. — La tablo staras malrekte kaj kredeble baldaŭ renversiĝos. — Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren sur la kampon. — Malamiko venis en nian landon. — Oni tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron. — La edzino de mia patro estas mia patrino kaj la avino de miaj infanoj. — Sur la korto staras koko kun tri kokinoj. — Mia fratino estas tre bela knabino. — Mia onklino estas bona virino. — Mi vidis vian avinon kun ŝiaj kvar nepinoj kaj kun mia nevino. — Lia duonpatrino estas mia bofratino. — Mi havas bovon kaj bovinon. — La juna vidvino fariĝis denove fianĉino.

mezo milieu.
kreski croître.
dika gros.
larĝa large.
lumi luire.
mola mou.
turmenti tourmenter.
senti sentir, éprouver.
beni bénir.
nobla noble.
rekta droit, direct.
kurba courbe, tortueux.
kredi croire.
renversi renverser.
supre en haut.
monto montagne.
kampo champ.
koko coq.
nepo petit-fils.
nevo neveu.

mière; mais il faut évidemment un écartement plus grand de ces deux mêmes battants pour constituer la seconde. L'Esperanto est donc logique en ne confondant pas les simples négatifs avec les contraires; il y a une nuance et souvent une très forte nuance entre les uns et les autres. Ainsi être *neriĉa* (non riche) est beaucoup moins regrettable que d'être *malriĉa* (pauvre).

A côté des négatifs l'Esperanto possède encore les privatifs constitués par *sen* (sans) employé comme préfixe. Ex. : *senhonta* sans honte, éhonté; *senriska* qui est sans risque, sûr; *senĉesa* qui est sans cesse, continuel; *senrompa* qui est sans rupture, continu.

32e EXERCICE

Suffixe de l'instrument, il — *et suffixe des collections, des ensembles*, ar.

(Voir pages 32 et 33).

La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon. — Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon? — Mi volis ŝlosi la pordon, sed mi perdis la ŝlosilon. — Ŝi kombas al si la harojn per arĝenta kombilo. — En somero ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en vintro ni veturas per glitveturilo [1]. — Hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenos miajn glitilojn kaj iros glitumi. — Per hakilo ni hakas, per segilo ni segas, per fosilo ni fosas, per kudrilo ni kudras, per tondilo ni tondas, per sonorilo ni sonorigas, per fajfilo ni fajfas. — Mia skribilaro [2] konsistas el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo. — Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj buŝtuketo. — En varmega tago mi amas promeni en arbaro. — Nia lando venkos, ĉar nia militistaro estas granda kaj brava. — Sur kruta ŝtuparo li levis sin al la tegmento de la domo. — Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron. — Sur tiuj

1. Veturi c'est aller à l'aide d'un véhicule. Vetur'il'o c'est l'instrument, le véhicule qui vous transporte, la voiture. Glit'vetur'il'o c'est le véhicule qui glisse, la voiture glissante, le traîneau.
2. *Mia skribilaro* l'ensemble de mes instruments pour écrire.

ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin[1] grandaj brutaroj, precipe aroj da bellanaj ŝafoj.

viando viande.
poŝo poche.
korko bouchon.
tiri tirer.
ŝtopi boucher.
botelo bouteille.
ŝlosi fermer à clef.
kombi peigner.
somero été.
gliti glisser.
glitumi patiner.
frosto gelée.
vetero temps (température).
haki couper à la hache.
segi scier.
fosi creuser le sol.
fosilo bêche.
kudri coudre.
tondi tondre.
tondilo ciseaux.
sonori sonner (intrans.).
fajfi siffler.
inko encre.
sablo sable.
sorbi faire lentement passer en soi.
brando eau-de-vie.
tuko (un) linge.
militi guerroyer.
brava brave.
kruta roide, escarpé.
ŝtupo marche.
Hispano Espagnol.
Germano Allemand.
tamen pourtant, néanmoins, cependant.
vasta vaste, étendu.
herbo herbe.
paŝti paître.
bruto brute, bétail.
precipe principalement, surtout.
lano laine.
ŝafo mouton.

33° EXERCICE

Suffixe des idées concrètes, **aĵ** — *et suffixe de la qualité abstraite*, **ec**.

(Voir pages 33 et 34).

Vi parolas sensencaĵon, mia amiko. — Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo. — L'akvo estas fluidaĵo.

1. Ici comme toujours c'est l'Esperanto qui est logique et nous qui ne le sommes pas. Si nous admettons : „ pais mes brebis, paître un troupeau," nous devons dire „les brebis se paissent," quand elles paissent dans un champ.

— Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian suspektan malklarajon. — Sur la tablo staris diversaj sukerajoj. — En tiuj ĉi boteletoj troviĝa- diversaj acidoj : vinagro, sulfuracido, azotacido kaj aliaj. — Via vino estas nur ia abomena acidaĵo. — La acideco de tiu ĉi vinagro estas tre malforta. — Mi manĝis bongustan ovaĵon. — Tiu ĉi granda altaĵo ne estas natura monto. — La alteco de tiu monto ne estas tre granda. — Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo. — La ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo. — Glaciaĵo estas dolĉa glaciigita frandaĵo. — La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas ankoraŭ pli granda. — Li amas tiun ĉi knabinon pro ŝia beleco kaj boneco. — Lia heroeco tre plaĉis al mi. — La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj. — Mi vivas kun li en granda amikeco.

kuko gâteau.
konfiti confire.
fluida liquide.
enhavi avoir en soi, contenir.
suspekti suspecter, soupçonner.
acida aigre, acide.
vinagro vinaigre.
ovaĵo omelette.
sulfuro soufre.
azoto azote.
gusto goût.
alta haut.
naturo nature.
paki empaqueter, emballer.
pakaĵo bagage.
ĉemizo chemise.
kolo cou.
kolumo faux-col.
manumo manchette.
cetera autre (le reste).
tolo toile.
glacio glace.
frandi aimer les friandises

frandaĵo friandise.	**kovri** couvrir.
heroo héros.	**naĝi** nager.
plaĉi plaire.	**folio** feuille.
lago lac.	

L'importance pratique de ces deux suffixes et l'habitude illogique qu'ont certaines de nos langues et notamment le français, d'employer le même mot pour l'idée concrète et pour l'idée abstraite nous engagent à insister sur ce point et à présenter avec plus de développements et d'exemples les explications données sur les deux suffixes **aĵ** et **ec** aux pages 33 et 34.

Ec et **Aĵ**.

Le suffixe *ec* ne se soude qu'à des racines marquant *la qualité* ou *l'état*.

Avec *ec* l'idée est abstraite; avec *aĵ* elle est concrète. — Exemples : *Infaneco* (enfance), l'état dans lequel nous sommes pendant la première période de la vie; *infanaĵo* (enfantillage), acte ou parole qui conviendraient dans un enfant, qui seraient dignes de lui, mais qui ne conviennent pas dans un homme mûr. *Amikeco* (amitié), l'état qui existe entre amis; *amikaĵo* (une amitié), un acte ou une parole d'amitié, un procédé amical. — *Moleco*, état de ce qui est mou; *molaĵo*, partie molle de quelque chose, et, au figuré, acte de mollesse. — Exemples : La mollesse (*moleco*) de la cire permet d'y imprimer tout ce qu'on veut, mais la dureté (*malmoleco*) du diamant est proverbiale. — Ce fruit a une partie très mûre et par conséquent molle; mais il a une partie non mûre et par conséquent dure. Prenez la première, je veux dire

la partie molle (*molaĵon*) et laissez-moi la seconde, c'est-à-dire la partie dure (*malmolaĵon*). — Le vinaigre est une chose acide, c'est donc un *acidaĵo* et il possède de l'acidité (*acidecon*).

Si je suis beau, bon, fort, etc., je possède la beauté (*belecon*), la bonté (*bonecon*), la force (*fortecon*), etc. ; j'ai alors de bonnes choses, des qualités (*bonaĵojn*). Si, au contraire, je suis laid, mauvais, faible, j'ai de mauvaises choses, des défauts (*malbonaĵojn*), car évidemment la laideur, la méchanceté et la faiblesse sont par elles-mêmes des qualités non bonnes, mais mauvaises et, partant, des défauts.

Par conséquent, les qualités bonnes sont des *bonaĵoj* et ce que le français nomme des *défauts* donne, en Esperanto, des *malbonaĵoj*. Eco par lui-même n'exprime donc pas plus quelque chose de bon que quelque chose de mauvais. D'ailleurs, même en français, le mot *qualité* signifie uniquement ce par quoi vous devenez tel ou tel. Ne disons-nous pas en français „de très mauvaise qualité?"

Remarque. — Pour exprimer l'idée purement en elle-même, c'est-à-dire ni sous la forme d'une qualité abstraite (*eco*), ni sous la forme d'une chose concrète (*aĵo*), l'Esperanto emploie la racine seule avec *o*. C'est ainsi qu'il traduit les mots *bien*, *utile* et *agréable* dans les phrases suivantes : la langue internationale vise le bien de toute l'humanité (*bonon*). — Joindre l'utile (*utilon*) à l'agréable (*agrablo*).

Par tout ce que nous venons de dire, on voit qu'il y a une différence entre *bono* (le bien en lui-même), *boneco* (la bonté), *bonaĵo* (une bonne chose, une qualité). Une même différence existe entre *acido* (un acide), *acideco* (l'acidité), et *acidaĵo* (une chose acide). L'acide sulfurique

est *acido*, mais le vinagre n'est qu'un *acidaĵo*, quoique tous deux possèdent l'*acideco*. Le *blanko* est la couleur blanche, le blanc en lui-même; la *blankeco* est l'état, la qualité d'un objet blanc envisagé au point de vue de la couleur; enfin *blankaĵo* est une chose blanche : la lune, la neige sont *blankaĵoj* (des blancheurs).

Rappelons, en finissant, que l'Esperanto n'emploie le suffixe *aĵ* que lorsqu'il est absolument nécessaire. Si la racine avec *o* suffit pour exprimer l'idée, il n'ajoute jamais *aĵ*. Citons par exemple : *votre dire*, *votre réponse*, *votre effort*, etc. (*via diro*, *respondo*, *peno*). Il n'emploie jamais *aĵ* en pareils cas.

34ᵉ EXERCICE

Affixes pour marquer la réunion des deux sexes, ge — *la parenté par mariage*, bo — *la descendance*, id.

(Voir pages 33 et 35).

Patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj. — Petro, Anno kaj Elizabeto estas miaj gefratoj. — Gesinjoroj N. hodiaŭ vespere venos al ni. — Mi gratulis telegrafe la junajn geedzojn. — La gefianĉoj staris apud la altaro. — La patro de mia edzino estas mia bopatro, mi estas lia bofilo, kaj mia patro estas la bopatro de mia edzino. — Ĉiuj parencoj de mia edzino estas miaj boparencoj, sekve ŝia frato estas mia bofrato, ŝia fratino estas mia bofratino; mia frato kaj fratino (gefratoj) estas la bogefratoj de mia edzino. — La edzino de mia nevo kaj la nevino de mia edzino estas miaj bonevinoj. — Virino, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino. — La doktored-

zino[1] A. vizitis hodiaŭ la gedoktorojn P. — Li ne estas lavisto, li estas lavistinedzo. — La filoj, nepoj kaj pranepoj de reĝo estas reĝidoj. — La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas de Izraelo. — Ĉevalido estas nematura ĉevalo, kokido nematura koko, bovido nematura bovo, birdido nematura birdo[2].

ge les deux sexes réunis;
ex. **patro** père — **gepatroj** les parents (père et mère).
gratuli féliciter.
altaro autel.
kuraci traiter (une maladie).
doktoro docteur.

pra bis-, arrière-.
id enfant de, descendant de;
ex. **bovo** bœuf — **bovido** veau; **Izraelo** Israël — **Izraelido** Israëlite.
hebreo juif, hébreu.
ĉevalo cheval.

35° EXERCICE

Suffixes pour le membre de. **an** — *le chef de.* **estr** — *le professionnel,* **ist** — *l'homme caractérisé par.* **ul**.

(Voir pages 32 à 37).

La ŝipanoj devas obei la ŝipestron. — Ĉiuj loĝantoj de regno estas regnanoj[3]. — Urbanoj estas ordi-

1. **Kuracisto** médecin, **doktoro** docteur en quoi que ce soit; par conséquent **kuracistino** médecin-femme et **doktorino** doctoresse. **Kuracistedzino** femme de médecin; **doktoredzino** femme de docteur, femme de quiconque est docteur en une science quelconque.

2. Le poulain, le poulet, le veau, l'oisillon sont les *petits* du cheval, du coq, du bœuf (espèce), de l'oiseau. Le sens intime de *id* est donc *petit de*. Il va de soi qu'une fois parvenus à la maturité ils deviennent à leur tour *ĉevalo, koko, bovo, birdo*. De même le *princido*, jeune prince, s'appellera *princo* quand son âge ne permettra plus de le regarder comme jeune. Alors, pour le distinguer de son père, quand il en sera besoin, nous devrons dire *la filo de l'princo* ou *la princo-filo*. Mais, quel que soit leur âge, les descendants d'Israël ne deviendront jamais d'autres Israël, aussi ne les appellerons-nous toujours qu'*Izraelidoj*.

3. Le mot exact nous manque. „Sujets" serait faux, puisqu'il représente aussi bien les membres d'un empire que ceux d'un royaume et ne s'applique pas à ceux d'une république

nare pli ruzaj, ol vilaĝanoj. — La regnestro de nia lando estas bona kaj saĝa reĝo. — La Parizanoj estas gajaj homoj. — Nia provincestro estas severa, sed justa. — Nia urbo havas bonajn policanojn, sed ne sufiĉe energian policestron. — Luteranoj kaj Kalvinanoj estas kristanoj. — Germanoj kaj Francoj, kiuj loĝas en Rusujo, esta Rusujanoj, kvankam ili ne estas Rusoj. — Li estas nelerta kaj naiva provincano. — La loĝantoj de unu regno estas samregnanoj[1], la loĝantoj de unu urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de unu religio estas samreligianoj. — Nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro. — La botisto faras botojn kaj ŝuojn. — La lignisto vendas lignon, kaj la lignaĵisto faras tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn. — Ŝteliston neniu lasas en sian domon. — La kuraĝa maristo dronis en la maro. — Verkisto verkas librojn, kaj skribisto simple transskribas paperojn. — Ni havas diversajn servistojn: kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston. — La riĉulo havas multe da mono. — Malsaĝulon ĉiu batas. — Timulo timas eĉ sian propran ombron. — Li estas mensogisto kaj malnoblulo. — Preĝu al la Sankta Virgulino.

an membre de, habitant de; ex. : **regno** état, **regnano** citoyen; **Parizo** Paris — **Parizano** (un) Parisien.
regno l'État.
vilaĝano villageois.
provinco province.
severa sévère.
justa juste.
polico police.

1. Pas d'équivalent en Français. Ce mot veut dire membres-du-même-état, concitoyens (du même état).

sufiĉe suffisamment.
Kristo Christ.
Franco Français.
sama même.
konfesi avouer.
religio religion.
regimento régiment.
boto botte.
ŝuo soulier.
lasi laisser.
droni se noyer.
verki composer, faire des ouvrages (littér.).
ul qui est caractérisé par telle ou telle qualité; ex.: **bela** beau — **belulo** bel homme.
eĉ même, jusqu'à.
ombro ombre.
preĝi prier (Dieu).
virga virginal.

Quelques explications sur les trois suffixes *ist*, *an*, *ul* nous paraissent utiles pour bien fixer l'esprit sur l'emploi qu'en fait l'Esperanto. Nous les donnons ci-dessous et les recommandons à l'attention de l'étudiant.

Ist et An.

Le sens intime du suffixe „*ist*“ est: „*qui s'occupe spécialement de...*“, qui fait plus ou moins d'un art, d'une science ou d'un métier sa principale occupation, la grande affaire de sa vie, en un mot sa profession.

Comme on le voit, la considération de gain ne doit pas guider sur ce point, mais uniquement la considération d'occupation ordinaire, habituelle, spéciale. S'il est vrai que le métier comporte une idée de gain ou d'argent, il ne l'est pas moins que la *profession* ne comporte pas la même idée. Pensons-nous au gain ou au profit, quand nous donnons à quelqu'un le nom de musicien, d'artiste, de légiste, de prédicateur, de linguiste ou de missionnaire?

Aussi, page 36, n'avons-nous pas dit que *ist* marque le métier, mais qu'il marque la profession, mot dont le sens est infiniment plus étendu.

Nous appellerons donc *pordisto* (concierge, portier) l'homme qui a la garde d'une porte d'entrée, car cet homme s'occupe spécialement d'une porte, quoiqu'il ne fasse pas de portes. S'il avait la profession, non pas de garder mais de faire des portes, nous l'appellerions *pordfaristo*, comme nous appelons *bierfaristo* (brasseur), *brandfaristo* (bouilleur), celui qui fait la bière, l'eau-de-vie.

Le sens intime de *an* est *membre de...* Ainsi, comme les habitants d'un pays, les adeptes d'une religion, d'un parti, d'une société, etc., sont vraiment membres de ce pays, de cette religion, de ce parti, de cette société, etc., nous pouvons dire *landano* (un habitant du pays), *urbano* (citadin), *Amerikano* (un Américain), *Parizano* (un Parisien), *kristano* (chrétien), *mahometano* (mahométan), *luterano* (luthérien), *partiano* (partisan), *klubano* (clubiste), *societano* (sociétaire), *senatano* (sénateur), *regnano* (un membre de l'État), etc.

Cette explication sur le sens spécial de *ist* et de *an* fait comprendre que nous devions dire *Esperantistoj* et non *Esperantanoj*, car nous ne disons pas *lingvano*, *propagandano*, *muzikano*, etc. Par essence, l'Esperanto est une langue et on ne peut être membre d'une langue. Mais on peut, par contre, s'occuper spécialement de langues, de l'Esperanto, et être à cause de cela appelé linguiste ou Espérantiste.

UL.

Ce suffixe sert à exprimer l'idée de ,,*personne caractérisée par*... "

Par conséquent, l'homme caractérisé par sa bonté, sa beauté, sa justice, sa force, etc.; par l'amour qu'il a pour la paix, le babillage, le mensonge, etc., sera *bonulo*, *belulo*, *justulo*, *fortulo*; *paculo*, *babilulo*, *mensogulo*.

De même, comme la pauvreté, la jeunesse, l'avarice caractérisent vraiment l'homme qui les possède, nous l'appellerons *malriĉulo*, *junulo*, *avarulo*.

Mais, par contre, comme la lecture, la visite, le travail ne caractérisent pas les hommes qui s'y livrent, nous n'emploierons jamais *ul* pour les désigner, et nous dirons uniquement *leganto*, *vizitanto*, *laboranto*. Nous agirons naturellement ainsi pour tous les cas analogues.

36° EXERCICE

Diminutif, et — *augmentatif*, eg — *suffixes de caresse* : ĉj, nj.

(Voir pages 33 à 36).

Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj kelke da segetoj. — En nia lando ne troviĝas montoj, sed nur monteto j. — Tuj post la hejto, la forno estis varmega; post unu horo, ĝi estis jam nur varma; post du horoj, ĝi estis nur iom varmeta; kaj post tri horoj, ĝi estis jam tute malvarma. — En somero ni trovas malvarmeton en densaj arbaroj. — Li sidas apud la

tablo kaj dormetas. — Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo al nia domo. — Sur lia vizaĝo mi vidis ĝojan rideton. — Kun bruo oni malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton. — Tio ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego. — Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion fari. — Antaŭ nia militistaro staris granda serio da pafilegoj. — Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion iliaj gepatroj nomas Johanĉjo (aŭ Joĉjo), Nikolĉjo (aŭ Nikoĉjo aŭ Nikĉjo aŭ Niĉjo), Erneĉjo (aŭ Erĉjo), Vilhelĉjo (aŭ Vilheĉjo, aŭ Vilĉjo, aŭ Viĉjo), Manjo (aŭ Marinjo), Klanjo kaj Sonjo (aŭ Sofinjo).

densa épais, dense.
brui faire du bruit.
kaleŝo carrosse, calèche.
pluvo pluie.
pafi tirer, faire feu.

ĉj, nj après les 2-5 premières lettres d'un prénom masculin (nj-féminin) lui donne un caractère diminutif et caressant.

Pour lui éviter toute méprise au sujet de *et* et de *eg*, nous appelons l'attention de l'étudiant sur les remarques suivantes :

Et n'est pas toujours synonyme de *petit*, quoique, d'après quelques mots, nos langues puissent le faire croire.

Si *et* équivalait juste à *petit*, „rivereto“ signifierait petite rivière, tandis qu'il signifie *ruisseau*. Par le fait, ce suffixe est à tout instant plus amoindrissant, plus affaiblissant pour l'idée que le simple adjectif *petit*. Le mot *rivereto* le prouve, car entre lui et *rivero* se place *malgranda rivero*, comme entre

monto (montagne) et *monteto* (colline) se place *malgranda monto* (petite montagne).

Mais prenons quelques mots et ajoutons-leur *eg* et *et*, afin de montrer les degrés atteints par la même idée grâce à ses deux suffixes : *Varmeta* (tiède), *varma* (chaud), *tre varma* (très chaud), *varmega* (brûlant); *beleta* (joli), *bela* (beau), *tre bela* (très beau), *belega* (superbe); *rivereto* (ruisseau), *malgranda rivero* (petite rivière), *rivero* (rivière, cours d'eau), *granda rivero* (grand cours d'eau), *riverego* (cours d'eau immense, cours d'eau des plus importants); *rideti* (sourire), *ridi* (rire), *ridegi* (rire à gorge déployée, rire aux éclats); *kanteti* (fredonner), *kanti* (chanter), *kantegi* (hurler); *ameti* (affectionner), *ami* (aimer), *tre ami* (aimer beaucoup), *amegi* (adorer).

Eg n'est pas du tout synonyme de *très*, autrement *varmega* ne serait pas traduit plus haut par *brûlant*, mais seulement par *très chaud*, ce qui est évidemment bien différent. De même *grandega*, traduit par *énorme*, *immense*, le serait seulement par *très grand*.

Entre le *varma* et le *varmega* se place le *tre varma*; de même entre le *granda* et le *grandega* se place le *tre granda*.

